



Pos-Amiko

IJK 2022, ĵaŭdo, numero 47

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

Venkanto de internacia vespero estos sendita al Eŭrovido

Ĉiuj kontribuoj estas hodiaŭ eĉ pli aĉaj ol kutime, ĉar neniu volas iri al malbela kaj pluv-plena Britujo.

TEJO ŝanĝas nomon pro klimata krizo

La klimata krizo atingas novan pinton hodiaŭ, en la plej varma tago de la nederlanda IJK. Partoprenantoj suferas en la suno, daŭre suferas en la ombro, kaj plej suferas en siaj tendoj. Sed tiuj estas nur la rektaj, personaj spertoj. Kompreneble en pli granda skalo la tutmonda varmiĝo kaŭzas tre seriozajn problemojn, ekzemple longdaŭra sekeco, fuŝiĝo de rikoltoj, kaj pliofteco de ĝenaj protestoj. Kaj du aliaj grandaj antaŭvideblaj problemoj estas pli multaj rifuĝantoj, kaj pli oftaj kaj pli grandaj inundoj.

Inundoj endanĝerigas la Centran Oficejon en Roterdamo, kiu bonŝance baldaŭ estos vendita. La restanta oficejo do baldaŭ translokiĝu al Tuluzo aŭ Prago (kiel jam diskutita en la julia Pos-Amiko). La arĥivoj de TEJO kompreneble moviĝu al la nubo, ĉar estas la 21-a jarcento kaj ni ne estas UEA.

Sed kio pri la homoj mem? Por movi aktivulojn, rifuĝantojn kaj kongresanojn malgraŭ ajnaj inundoj necesas lerni konstrui flosojn, kaj disvastigi la scion. Kaj por respeguli la atenton pri tiu krizo la asocio sin renomiĝos Tutonda Esperanto-Junulara Organizo. Tiu ŝanĝo de unu letero evitas la neceson ŝanĝi la emblemon, sed bone substrekas la sindiĉon al estonta tutonda klimata agado.

LA HOROSKOPO

- Ŝafo:** Pli facilas konstrui flosan, se en via teamo estas nur malpezaj membroj.
- Taŭro:** Vestajoj estas nur socia elpenŝaĵo. Fordonacu viajn, aŭ prenu tiujn de naĝantoj.
- Ĝemeloj:** Komencu ĉiun vian tagon bone per eta preĝo al la ĉiopova Koko Poso.
- Kankro:** Se vi ie trovas profundan inspiron, bonvolu meti ĝin en la akceptejo ĉe perditaĵoj.
- Leono:** Vi trovos la solvon al ĉiuj demandoj, pri kiuj vi ne interesiĝas.
- Virgulino:** Post latineca diskejo vi ne plu estos.
- Pesilo:** Vi lernis Ido kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.
- Skorpio:** Vi malkovras, ke pli interesas mito ol Ido.
- Joost:** Ĉiuj pensas, ke vi preferas gufujon ol trinkejon, sed vi scias, ke tio pravas.
- Sagitario:** Ne necesas muziko por internacia vespero, sufiĉas du homoj kaj unu ĉambro.
- Kaprikorno:** Provu vendi iun libron al la libroservo hodiaŭ.
- Akvisto:** La kongresejo povas lavi viajn vestaĵojn, sed ne vian monon nek pensojn.
- Fiŝoj:** Rezignu pri viaj provoj vekigi ĝustatempe, simple ne plu iru dormi.

Programo

	<u>Mangejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u>	<u>Filmejo</u>	<u>Gufujo</u>
08:00	Matenmanĝo				
09:00		Tajĵi			
10:00	Ido sen mitoj	Kurso por			
11:00	Novaj vortoj	progresantoj			
12:00	Tagmanĝo				
13:00					
14:00	KER-kunsido		Kongao	Feri	
15:00		Ultima frisbeo	Kizombo		EO tipa manĝo
16:00		Konstruado de		Okcitana lingvo	
17:00	FR-DE amikeco	flosojo	Kvizo pri Azio	Nedrinkemuloj	BEMI
18:00	Vespermanĝo				
19:00					
20:00			Internacia		
21:00			vespero		
22:00	Trinkejo		Latineca diskejo		Gufujo